

Pri la naturprotekta rolo de la heĝoj

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI-833/309, 1979 septembro 27 kaj 29

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-1979-46/SRI-1979-46-B-6-309-833-1979-09-27-29-Claude-kaj-Andree-Gacond-Pri-la-naturprotekta-rolo-de-la-heghoj.mp3>

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond nome de Svisa Radio Internacia.

En la monato aŭgusto ni dediĉis du elsendojn al la temo naturp-rotektado, kaj ni tiam raportis pri la aktiveco de Ligo Svisa por la Natur-Protitektado. Ni revenu al tiu ĉi temo por raporti pri aspekto de la eldonaktiveco de tiu ĉi grava ligo.

A.- De tempo al tempo Ligo Svisa por la Natur-Protitektado dediĉas numeron de sia monata bulteno al tre preciza temo. Tiujn specialajn numerojn ĝi tiam vastskale disdonas en la celo influi la publikan opinion favore al la natur-protitektado. En 1978 speciala numero atentigis la publikon pri la energia problemo kaj en tiu ĉi jaro speciala numero raportas pri la naturprotekta rolo de la heĝoj.

Cl.- Nia vortaro PIV difinas tiel la vorton heĝo: "Barilo el interplektiĝantaj arbedoj". Jen fakte la tipe popoleca sinteno rilate al la koncepto heĝo. Sed fakte heĝo estas multe pli ol nura barilo el interplektiĝantaj arbedoj. La broŝuro de Ligo Svisa por la Natur-Protitektado ĝin difinas tiel: "kordono da arboj kaj arbustoj aŭ nure da arbustoj."

A.- Tiu ĉi kordono da arboj kaj arbustoj ofte apartigas kampojn. Kiam ĝi povas nature disvolviĝi, ĝi fariĝas same riĉa je arbospecoj kiel arbaro natura. Oni tiam parolas pri natura heĝo, opozicie al la artefaritaj hegoj, kies rolo reduktiĝas al barilo kaj kiuj plej ofte konsistas el unu sola arbusta speco, kiun oni regule tondas.

Cl.- Natura heĝo grupigas ĝenerale arbojn 10 ĝis 15 metrojn altajn, ĝenerale alnojn kaj kverkojn. Mezetaĝe kreskas arbustoj kiel frangoloj, viburnoj, opuloj aŭ neĝbuloj, ktp. Fine teretaĝe kreskas dudeko da herbsppecoj.

A.- Natura heĝo konsistigas komunecon vegetalan kaj animalan kaj ilian biotopon. Tion ĉi oni nomas ekosistemo.

Cl.- Por gajni kampsurfacojn la moderna agrokulturo tendencis malaperigi tiujn naturajn heĝojn. Nun oni ekkonscias, ke la malaperigo de tiuj kordonoj da arboj kaj arbustoj estas fine malfavora al la agrokultura produktado mem kaj ke ĝi tendencas dezertigi regionojn, kiuj antaŭe estis ege riĉaj. Senheĝa kamparo fariĝas viktimo de la ventblovado kaj blovitaj plantoj kreskas malpli rapide ol tiuj, kiujn protektas heĝoj. Tion ĉi malkovris la kamparanoj ekde la antikveco, kaj la naturaj heĝoj tre ofte estas restaĵoj de la praarbaro, kiun la unuaj kultivantoj evitis forbruligi favore al la protektado de la agrokultura kaj breda aktivecoj.

A.- la modernuloj komencis malami la heĝojn, ĉar ili konstatis, ke je ilia bordo la tritiko aŭ maizo ne bone kreskis. Nun oni scias, ke tiuj rubandoj, kie la kreskado de la kultivaĵoj estas iom bremsataj, larĝas nur je proksimume du metroj, sed ke poste en la surfaco ŝirmita de la vento la produkto pliiĝas je minimume 6 procentoj kaj ĝis 20 procentoj. Tial oni sisteme replantas heĝojn.

Cl.- Kial tiu ĉi produktokresko en la zonoj ŝirmitaj de heĝoj? Oni nun povas respondi tiel. La kurten-ŝirmejo, kiun formas heĝo protektas kontraŭ la mekanikaj rezultoj de la vento: misformigo de la junaj plantidoj, kuŝigo de la tritiktigoj, malaltigo de la polenigo far la abeloj kaj aliaj insektoj. La heĝkurtenoj malpliigas la klimatajn diferencojn. La malpliigo de la ventrapideco reduktas la ŝvitelvaporadon kaj la akvoperdon de la grundo. Ju pli rapidas la ventblovo, des pli fermiĝas la stomoj de la plantoj, tio estas la brososimilaj aperturoj troviĝantaj multnombro en la epidermo de la plantoj. Tra la stomoj pasas aero, vaporo kaj karbona dioksido, do se ili fermiĝas, pli malviglaj fariĝas tiuj gasinterŝanĝoj kun la atmosfero kaj konsekvence pli malvigla la produktado de la plantoj pere de fotosintezo.

A.- La observado de la faŭno vivanta en natura heĝo komprenigas la kompleksecon de tiu ekosistemo. En la arboj, kiuj formas la superan etaĝon vivas multaj birdoj, inter kiuj rabuloj. Sur la teretaĝo vivas insektovoruloj kaj ronguloj, batracoj, reptilioj, kreskas fungoj, abundas insektoj. En la tero mem vivas mikrofaŭno nepre necesa al la vivo de la grundo. Malaperigi heĝon, tio signifas malrespekti tiujn ĉi kompleksajn ekvilibrojn kaj alveni al malagrablaj surprizoj: plirapidiĝo de la ventoj, mineraliĝo de la kampoj, malriĉiĝo de la grunda mikrofaŭno, disvastiĝo de plant- kaj best-malsanoj, iompostioma malriĉiĝo de la grundo, kiu bezonas pli kaj pli da artefaritaj kreskigiloj.

Cl.- Per interesaj fotoj la broŝuro pri la rolo de la heĝoj, kiun eldonis Ligo Svisa por la Natur-Protektado, atentigas la publikon pri tiuj ne antaŭviditaj konsekvencoj kaj ankaŭ montras, ke en la urboj mem heĝoj iom pli naturaj ol la monotonaj tonditaĵoj povus favori la instaladon de multaj birdoj kaj bestetoj. Ankaŭ kontraŭ la bruo la heĝoj havas certan utilon, kaj kontraŭ la aŭtomobila aer-malpurigo.

A.- Ni estas certaj, ke tiaj dokumentoj, inteligente prezentitaj kaj science argumentitaj, havas revolucionan influon. La broŝuro pri la heĝoj, pri kiu ni raportis hodiaŭ, redonos vivon al mortantaj heĝoj, kiuj reduktiĝis al pikdratoj, kie jaron post jaro oni bruligas la vegetaĵojn, kaj instigos kampanojn reekzameni sian agroproduktadon, provante rekrei pli da ekvilibro.

Cl.- La esperanta termino heĝo etimologie ligiĝas al malnova vorto "haga". El tiu ĝermana vorto naskiĝis la franca termino "haie" kaj la germanaj "Hag" kaj "Hecke". Se dum la komenco de la dudeka jarcento la koncepto mem de heĝo tendencis degeneri, perdante sian signifon de arbareto por nur konservi tiun de barilo malbelaspekta, ni estas certaj, ke dank' al la scienca observado, kiu komprenigis ke heĝo estas kompleksa ekosistemo ege utila, la koncepto mem de heĝo revaloriĝos, kaj ke ankaŭ en la esperanto-vortaroj oni alvenos al pli kontentigaj difinoj. Fine la vortaroj spegulas la ĝeneralan opinion rilate al la klarigitaj vortoj.

A.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Prelegis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!